# ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ◆ Esperantobladet ◆ huhtikuu ◆ aprilo ◆ 2/2003



*Wilhelmiina Reinhardt kaj Miamari Saastamoinen ĝenerale kontentas pri Mazi-kurso kaj kvizo sub gvido de Mikko Mäkitalo, kiu faris kiel premion por ili bildstrion pri la – kun peno – prononcebla profesivorto statistikisto. Baldaŭ estas tempo por hejmeniro. Ĉe la pordo jam atendas la gepatroj de Mia. (Artikolo sur p. 9)*

**Al kvalita komunikado, p. 16 ◆ Vintraj Tagoj, p. 4**

**Pekka Välimäki, s. 7 ◆ Cent jaroj de "La Espero Finlanda", p. 11**

# Esperantolehti

## Esperanta Finnlando ◆ Esperantobladet ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.
Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.
Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.
Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.
Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.
Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

**Toimitus/Redaktion/Redaktejo**: 💻 esperantolehti@esperanto.fi
Päätoimittajaa etsitään, yhteydenotot puheenjohtajalle (Anna Ritamäki, yhteystiedot alla)
Ĉefredaktoro serĉata, kontaktu la prezidanton (Anna Ritamäki, kontaktinformoj sube)
Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*
Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki. ☎ (09) 587 6738 💻 ilkka.santtila@esperanto.fi

**Tilaushinta/Prenumerationspris/Abonprezo:** 15 •/vuosi/år/jaro;
Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 10 •; Baltio 10 •, aliaj landoj 13,50 • .

**Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:**
Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538
Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.
Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto – Esperanto-Asocio de Finnlando.
Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

## Esperanto-Asocio de Finnlando ◆ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

**Prezidanto/Puheenjohtaja:** *Anna Ritamäki*
Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 📠 (02) 423 246 💻 anna.ritamaki@kolumbus.fi
**Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja:** *Päivi Saarinen*
Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 💻 paivi.saarinen@iki.fi
**Sekretario/Sihteeri:** *Tiina Oittinen*
Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 💻 tiina.oittinen@pp.inet.fi

**Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:**
*Eila Martin*, Intiönpolku 4 as. 36, 90100 Oulu. ☎ (08) 374 697
*Synnöve Mynttinen*, Koskenniskantie 5 D 39, 48400 Kotka. ☎ (05) 260 1326
*Jukka Noponen*, Viipurinkatu 27 A 12, 00520 Helsinki. ☎ (040) 5915767 ☎📠 (09) 1483871 💻 jukka.noponen@iki.fi
*Markku Saastamoinen*, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (03) 348 4245 💻 markku.saastamoinen@jippii.fi

**Vicestraranoj/Varajäsenet:**
*Raita Pyhälä*, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 💻 raitapy@jymy.kase.fi
*Eero Rinta-Karjanmaa*, Poppelikatu 11-13 A 24, 15520 Lahti. ☎ (03) 783 4448
*Tuomo Grundström*, Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ (050) 5180 590, (02) 822 7779 💻 tgrundstrom@lailanet.fi

**Kasisto/Rahastonhoitaja:** *Anna-Liisa Heikkinen*
Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449 💻 eafkasisto@esperanto.fi
Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

**Oficejo/Toimisto:** Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.
☎ (09) 715 538 (puh.vastaaja/aŭtomata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

**Ĉefdelegito de UEA/ UEA:n pääedustaja:** *Heta Kesälä*
Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎📠 (09) 275 5528
Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

**Internet**: http://www.esperanto.fi

# Unu jaron sur la vojo ...
# direkte al kvalita komunikado

Antaŭ unu jaro mi skribis pri Keko kaj Riko de la lernolibro Privilegia vojo al lingvoscio iam verkita de Vilho Setälä. Tiam mi ĵus ekhavis la privilegion de nova, gvida rolo en Esperantujo, en la lando de komunike privilegiitaj homoj. Tiutempe mi kontentis ke mi akceptis prezidantiĝi kaj ĝis nun mi ne bedaŭras. En la jarkunveno en Lahti mi reelektiĝis por daŭre kunlabori kun pozitivaj kaj laboremaj homoj en la estraro kaj ĉirkaŭ ĝi.

Komence de la pasinta jaro mi hezitis. La tiutempa estraro memoras miajn kontraŭdirojn al la ideo pri mia elektiĝo. Mi plendis kaj postuladis, eĉ obstinis. Min ĝenis la kostoj de aktivuleco. Mi insistis ke la dediĉita tempo, zorgokvanto, respondeco kaj – ankoraŭ kaj ankaŭ – mono igas la kostojn por gvida aktivulo neelteneblaj, almenaŭ se tiu gvida aktivulo estu mi! Mi lamentadis pri la neceso pagi por vojaĝoj, tranoktoj, manĝoj kaj kotizo al Vintraj kaj Aŭtunaj Tagoj en kiuj la ĉeesto de la prezidanto estas atendata, praktike postulata.

Fine mi venis al la konkludo ke la ŝancoj al kontentiga progreso estis tiom grandaj ke mi akceptu ekgvidi. Nur tiel mi ja vere havus la ŝancon elprovi miajn tezojn pri la esperantistoj kiel la ĉefa bonhavo de la esperantomovado kombinite kun altigitaj elspezoj kaj enspezoj cele al aktivo de la asocio. Mi venis al la konkludo ke drastaj ŝanĝoj ne necesas. Pli bonas pacienci, preni paŝon post paŝo. Unu tia paŝo, kiu speciale plaĉis al mi estis la okazigo de la kunsido de la redakta grupo en Lahti tagon antaŭ VT. Konfesindas ke ne nur plaĉis la kvalito de la diskutoj pri nia gazeto. Mi ankaŭ kontentis ĉar niaj vojaĝkostoj al Lahti estis repagitaj de EAF...

Pli grava kaj signifa progreso venis la tagon post VT. Tiam la streboj atingi signife pli grandajn enspezojn por EAF portis tre bonan frukton. La estraro de la Fondumo Esperanto akceptis nian peton por projekto Al kvalita komunikado. Dum tri jaroj ni havos sufiĉajn financajn rimedojn por stabiligo de la informa agado. La celo estas ke ni pli bone povu eluzi la homajn rimedojn je nia dispono.

Vintraj Tagoj en Lahti kun siaj prelegoj pri komunikado pere de radio, televido kaj gazetaro estis antaŭstarto. En Raumo 13-14 septembro ni daŭrigu kaj ankoraŭ ĉi-jare ni okazigos seminarion por aktivuloj. Tamen, antaŭ tio, ne forgesu la esperantokurson en la popola instituto Valamo 14-18 julio, la tuj postajn Internacian Junularan Kongreson kaj Universalan Kongreson en Svedujo ...

Krome, jam 13an de majo, pasos jubileo de la fondo de la unua registrita esperantoasocio en Finnlando. Tiu fondo okazis en Jyväskylä. Samurbe 15-18 junio okazos anglalingva konferenco pri interkultura edukado, kiun mi verŝajne povos ĉeesti kiel reprezentanto de EAF dank al la projekto.

Pere de la projekto Al kvalita komunikado ni havos la eblecon oferti ion pli kvalitan al ĉiuj ni, al la membraro. Ja la esperantomovado estas nenio sen la esperantistoj.

Dankante pro via intereso

*Anna Margareta*

# Radio kaj alio en la Vintraj tagoj

Sesdeko da esperantistoj kolektiĝis en la popolan instituton de Lahti por la Vintraj Tagoj de EAF kadre de temo sonoj, bildoj kaj sonbildoj. La temo multe koncentriĝis en radion, por kio Lahti estas ĝuste trafa loko pro sia muzeo pri radio kaj televido.

Loĝantoj de Lahti brilis per multnombra partopreno. Kelkajn eksterlandanojn oni ankaŭ vidis. Unu de ili estis Vilorg Teräväinen, kiu loĝas en Lahti, sed estas civitano de Ukrajnio. Li, post bonvenigaj vortoj de prezidantoj de EAF kaj la klubo de Lahti, rakontis pri la sortoj de sia familio en Sovetunio.

Post Vilorg estis vico de la ĉefpreleganto Katja Lampinen, studanto de komunikado kaj profesiulo de radio. Ŝi memorigis aŭskultantojn pri la novembra eksplodo en komerca centro Myyrmanni, kaj pri novaĵraportado de ĝi. Sonbendo de tiama radioelsendo konvinkis aŭskultantojn pri la informa forto de radio. Kvankam radio estas ne konsiderata plej moderna komunikilo, ĝi tamen povas oferti esprimfortan raporton.

Anna Ritamäki rakontis pri Esperantaj elsendoj en radioj, kaj rimarkigis, ke unua fojo kiam ŝi aŭdis parolatan Esperanton, estis tra radio, post ke ŝi studis leterkurson de Esperanto kaj sciiĝis pri la radiaj elsendoj. Ŝi ankaŭ ludis bendon de Zamenhof prononci Esperanton. La kvalito de la bendo el tempoj de Zamenhof estas ne bona kaj oni povas



***Gravaj decidantoj en Finnlando: El maldekstre prezidanto Tarja Halonen (pendanta sur muro), estrarano Päivi Saarinen, prezidanto Anna Ritamäki, estraranoj Eila Martin, Eero Rinta-Karjanmaa, sekretario Tiina Oittinen, estraranoj Markku Saastamoinen, Jukka Noponen kaj Tuomo Grundström.***



***La popola instituto estas unu de la plej ĉarmaj konstruaĵoj en Lahti. Aspekto de ĝia enirejo donas la pravan impreson, ke la domo enhavas ŝtuparejojn, kie ankaŭ aliaj ol la prezidanto de EAF maltrafadas vojon.***

apenaŭ kompreni, kion Zamenhof tie diras.

Oni aŭdis el bendo ankaŭ intervjuon de la prezidanto de EAF, kiun lastaŭtune faris radio Aino. Inter ĉio laŭdado de radio tamen oni ankaŭ memoris televidkanalon ATV per ĝia programo pri la jam iom fama rokgrupo Dolĉamar, kun intervjuo de la tierilataj esperantistoj kaj peco da muziko.

En vespera programo de la Vintraj Tagoj ĉefrolis konkurso en filmodublado kun teamoj de FEJO kaj EAF. Estis kvin pecoj de diversaj filmoj, por kiuj ambaŭ tripersonaj teamoj preparis Esperantajn parolojn kaj prezentis ilin por ke la publiko balotu pri la pli bona. Post komencaj malfacilaĵoj kun la unua filmpeco (desegnita Muumit-filmo) la teamoj akiris fluan ritmon de filmodublado kaj la publiko esprimis amuziĝajn reagojn. Ŝajnis, ke la plej plezurajn aplaŭdojn ricevis interpreto de FEJO pri la klasika Hitchcock-



***En la muzeo eblis provi uzadon de iloj de programfarado en radio kaj televido. Katja Lampinen (maldekstre) ŝajnis tute kontenta kaj prava intervjuanto eĉ antaŭ televida kamerao, kvankam ŝi estas fakulo en la flanko de radio. La uzanto de la kamerao kaj la intervjuato (meze) ankoraŭ eble ne scias, ĉu ili celas iam esti fakuloj en tio.***


filmo Psiko (Psyko/Psycho), kie FEJO antaŭvidis okazaĵojn en Aŭtunaj Tagoj en Rauma. FEJO venkis la konkurson per poentoj 3-2.

Lige de la jarkunveno de EAF estis anoncita la Aganto de la jaro, Tapio Sormunen pro aktiveco de jardekoj, dum lastaj tempoj prizorgo de membroregistro. Adiaŭajn vortojn de la prezidanto de EAF aŭskultis ankaŭ reprezentanto de la instituto, kaj EAF donacis lernolibron de Esperanto por ilia biblioteko. Dimanĉe ankaŭ estis la vizito en la muzeo pri radio kaj televidilo. La freŝigan promenon inter la VT-ejo kaj la muzeo benis printempeca sunbrilo, kiu tiel ŝajnis akompani esperantistojn en adiaŭado de kaj vintraj tagoj kaj la Vintraj Tagoj.

*Mikko Mäkitalo*




***Katja Lampinen demonstris, kiel oni en gazetaro celis fortajn bildojn pri la eksplodo en Myyrmanni, sed kiel oni same ankaŭ en radio uzis fortajn sonbildojn.***



***Patrik Austin kaj Mikko Mäkitalo gvidis vesperan kunkantadon per siaj gitaroj. Multaj ŝajnis amuziĝi, sed fotanto sukcesis kapti pruvon, ke iu decidis fuĝi tra malantaŭa pordo.***

# Terveisiä Enontekiöltä

## Haastattelemme Pekka Välimäkeä

*Hei, Pekka. Olet Suomen pohjoisin esperantolähettiläs, "delegito". Miten aikoinaan tutustuit esperantoon? Tunnetko kuuluvasi enemmän suomalaiseen vai kansainväliseen esperantoliikkeeseen? Onko Helsinki liian kaukana?*

Tutustuin esperantoon jo omana kouluaikanani. Myöhemmin opiskeluaikana palasin uudelleen esperanton pariin. Itseopiskelu oli minulle luontevin tapa opiskella. Koska harrastukseni yleensäkin ovat olleet sellaisia sisäänpäinkääntyneen ihmisen "omia juttuja", en ollut halukas lähtemään esperantojärjestöjen toimintaan mukaan. Paljon enemmän minua kiehtoi ajatus siitä, että osaisin kommunikoida ulkomaalaisten esperantistien kanssa, ajatus veljeydestä ja tasa-arvosta merkitsi paljon. Ainakin aikaisemmin tunsin siis paremmin kuuluvani kansainväliseen kuin suomalaiseen esperantoliikkeeseen. Tosin viime vuosina ovat yhteyteni suomalaiseen esperantoliikkeeseen koko ajan lisääntyneet, olen saanut paljon apua ja vinkkejä suomalaisilta esperantisteilta esperantokurssien järjestämisessä. Aktiivinen osallistuminen esperantotapahtumiin on kuitenkin täältä käsin hankalaa. Helsinki on tosiaan kaukana. Enontekiöltä Helsinkiin on suunnilleen yhtä pitkä matka kuin Helsingistä Moskovaan tai vaikkapa Berliiniin.

*Kerro jotakin Lapissa asumisen eduista!*

Olen asunut Lapissa nyt 15 vuotta, ja koko tämän ajan Lapissa asumisen edut ovat mielessäni pysyneet samoina. Luonnon läheisyys, kauneus ja puhtaus ovat niistä tärkeimpiä. Luonnossa liikkumisen vapaus ja hyvät metsästysmahdollisuudet ovat myös tärkeitä tekijöitä. Lapsille Lappi on turvallinen kasvuympäristö.

*Ja mainosta vielä vähän juuri Enontekiötä! Emme tunne sitä liian hyvin.*

Enontekiö on tunturien kunta, täällä tuntee olevansa todella Lapissa. Täällä jos jossakin on olemassa neljä erilaista vuodenaikaa: talven sininen kaamos, kevään kirkkaus, kesän yötön yö ja syksyn ruska ja rauha. Vierailijoille Enontekiö tarjoaa kaikkina vuodenaikoina runsaasti nähtävää ja koettavaa.

*Minkälaisessa koulussa opetat ja mitä?*

Opetan Enontekiön lukiossa matematiikkaa ja fysiikkaa. Lukiomme on pieni mutta tehokas. Oppilaita lukiossamme on nelisenkymmentä.

*Miten tulit tarjonneeksi esperanton kurssia oppilaille?*

Suomen lukioissa otettiin 90-luvun loppupuolella käyttöön uudet opetussuunnitelmat. Tällöin tuli mahdolliseksi tarjota oppilaille koulukohtaisesti ns. soveltavia kursseja.

Ehdotin lukiomme yhdeksi kurssiksi "Esperanton alkeet" -kurssia. Syksyllä 1998 järjestettiin sitten ensimmäinen 38 oppitunnin kurssi. Sen jälkeen kyseinen kurssi on ollut joka vuosi mahdollista valita osaksi lukion oppimäärää.

*Miten koulun johto/muut opet suhtautuvat esperanton opetukseen?*

Koulun johto on koko ajan suhtautunut hyvin myönteisesti esperanton opetukseen. Muut opettajat ovat suhtautuneet osin innos-

tuneesti, osin hienovaraisen neutraalisti.

Esperanto on jo tuttu juttu koulumme henkilökunnalle, joulujuhlassakin kuultiin ”Tonttujen jouluyö” -laulu esperantonkielisenä versiona.

*Onko sinulla nyt menossa tai tulossa uusi kurssi tai kerho?*

Tällä hetkellä Esperanton alkeet -kurssia suorittaa itsenäisesti 8 lukiomme oppilasta. He aikovat suorittaa kurssin toukokuun loppuun mennessä. Yläasteella käynnistyi myös esperantokerho, jossa on mukana viisi innokasta 9-luokkalaista.

*Onko esperanto tuonut mitään uutta sinulle tai koulullesi?*

Esperanto-kurssien ohjaaminen on tietysti aktivoinut myös omaa harrastusta kieltä kohtaan. Kansainvälisyyskasvatuksen kannalta esperantolla on paljon annettavaa. Käytännössä toteutamme kansainvälisyyttä osallistumalla esperantonkielisenä ryhmänä mahdollisesti keväällä 2004 ns. EU:n Euroscola -päivään Strasbourgissa. Toivottavasti matka järjestyy.

*Voiko esperanto vaikuttaa opiskelijoiden käsityksiin ihmisen kielellisistä ja muista oikeuksista ja tehdä heistä enemmän maailmankansalaisia?*

Uskon vakaasti näin. Siksi haluankin esitellä esperantoa oppilailleni. Esperanto on tosin vain yksi mahdollisuus kansainvälisyyskasvatuksessa. Esperanton opiskelu saattaa vaikuttaa jonkin verran suoremmin käsityksiin kielellisistä oikeuksista.

*Kiitos että suostuit haastateltavaksi. Toivotamme voimia ja hyvin esperantoista tulevaisuutta!*

*Esperantolehden puolesta*
*Raita Pyhälä*



***Pekka Välimäki ja neljä esperantokerholaista Enontekiön yläasteen 9. luokalta.***

# Ĉu vi konas junulon, kiu volas vojaĝi al Strasburgo?

En bona etoso okazis Mazi-kurso la unuan semajnfinon en marto. La du lernantoj jam lernis la lingvon en kurso de Sylvia Hämäläinen kaj ili dum la semajnfino en Källkullen havis okazon uzi ĝin ankaŭ dum la manĝado kaj aliaj aktivaĵoj.

Sabate Mikko Mäkitalo, FEJO-estrarano, rakontis al ili kaj al du lernantoj de la loka kurso en Kimito pri la agado de la junulara organizo. La kursanoj kune kun sia instruisto Carola Antskog montris la skeĉon ”Kiu doloras vin?”

Vespere oni kantis kune kaj ludis esperantajn kartludojn. Dimanĉe Mikko gvidis kvizon, kie la du partoprenantoj Mia kaj Wilhelmiina montris sin kune samnivelaj kiel la patro de Mia.

Pri la kurso en aprilo ni decidis pli bone reklami. Informo estis sendita al kvindek lernejoj kaj anonco pri ĝi estis en la gazeto Partio. Bedaŭrinde nur tri gejunuloj reagis kaj el ili finfine nur unu povis veni. Tial la kurso ne okazis. Nuligita estis ankaŭ la FEJO-renkontiĝo kiu devis okazi samtempe kaj samloke por ebligi renkontiĝon inter nunaj kaj estontaj membroj.

Ni provos denove la lastan semajnfinon en aŭgusto. Temas pri kursoj por komencantoj (laŭ la vidbenda kurso Mazi I). Ankoraŭ ni ne havas sufiĉajn lernantojn por



*Wilhelmiina Reinhardt kaj Miamari Saastamoinen iom frustriĝas je la vido de la fotilo dum Markku Saastamoinen ŝvitas apude ...*

daŭriga Mazi II-kurso.

Nun estas tempo por ĉiu esperantisto en Finnlando informi al siaj konatuloj pri la ebleco por junuloj per esperanto vojaĝi al Strasburgo por sperti la Eŭropan parlamenton dum Euroscola-tago. La vojaĝoj estas planataj por la printempoj 2004 kaj 2005. La ĉefaj kostoj por la partopreno estas pagitaj de EU.

Oni povas lerni la lingvon ie ajn, sed la kunordiganto Carola Antskog (kontaktinformoj vidu sub ELFI en la antaŭlasta kovrilo) devas scii la nomojn de la interesitoj.

Bona ideo estas ke tutaj familioj ĉi-somere partoprenu kurson en Valamo, la 14an ĝis la 18an de julio. Rekomendu tion al viaj najbaroj kaj partoprenu mem kune kun ili. Vi povas mem partopreni la daŭrigan kurson kaj la novaj adeptoj la kurson por komencantoj.

Kaj, ne forgesu informi pri la kurso en Kimito la 29an ĝis la 31a de aŭgusto! La kurskotizo de 53 eŭroj inkluzivas manĝojn, tranoktojn, instruadon kaj lernomaterialon. La ĉefa celgrupo estas 14-17-jaruloj, sed ankaŭ aliaj estas bonvenaj.

Laŭ peto estas haveblaj afiŝoj kaj pliaj informoj. Eble vi povas meti afiŝon ekz. sur anonctabulon de loka lernejo aŭ eĉ persone prezenti esperanton kaj la Euroscola-projekton al grupo.

*Carola Antskog*



***... sed evidente la du amikinoj kaj kunlernejaninoj ŝatas unu la alian daŭre.***

# Centjara datreveno de la unua registrita E-klubo en Finnlando

La 13-an de la venonta majo pasis cent jaroj post la fonda kunveno de la unua registrita E-klubo en Finnlando. En Finnlando estis esperantistoj jam almenaŭ ekde la jaro 1891 kaj kelktempe funkciis neregistritaj E-kluboj. La unua el ili estis ”Societo Esperantista Helsingforsa”, fondita la 26-an de septembro en Helsinki. Tamen naskiĝis nek registrita nek tutlanda societo. Apotekisto Augustinus Laurén (1869-1940), tiam en Kannus, skribis alvokon en la numero 6/1899 de ”Lingvo Internacia” por fondi tutlandan societon, sed tio ne portis sukceson. Eble influis la malfacila situacio de Finnlando, ĉar samjare komenciĝis forta premo de rusaj aŭtoritatuloj kontraŭ la aŭtonomeco de Finnlando.

En la jaro 1900 Laurén transloĝiĝis al Jyväskylä, kie li konatiĝis kun juna oficisto Kaarlo Juho Tuomas Kuntsi (1882-1934). Kune ili alvokis en majo 1903 kunvenon por fondi tutlandan societon. La kunvenon ĉeestis krom Laurén kaj Kuntsi ankaŭ komercisto Wilh. Oksanen, kontoristo T.Riekkola, konstrumajstro A.Edv. Henriksson, kontoristo W.Ahlroth, vendeja helpisto J.Lammi, studanto de komerca lernejo E.Rantanen, kontoristo Hilma Majava, telefonisto Hildur Hake, kontoristo Maija Mickelson, vendeja helpisto Kuvaaja, elektroteknikisto W.Sakari kaj vendeja helpisto O.Puolakka. La societo estis fondita kaj ricevis la nomon ”La Espero Finlanda”, kaj estis konstatita, ke ĝia celo estu disvastigi la internacian lingvon ”Esperanto”, initiacitan de d-ro L. Zamenhof en la jaro 1887. La fondaj dokumentoj troviĝas en la Nacia Arkivo.

Laurén kaj Kuntsi, kiuj estis la motoroj de la societo, havis ankaŭ pli praktikan planon: eldoni finnlingvan lernolibron de Esperanto. Ĝis tiam tia ne aperis kaj oni devis lerni la lingvon per svedlingvaj libroj. La bezono de la finnlingva libro estis granda, ĉar la granda majoritato de finnlandanoj scipovis nur la finnan.


La Imperiestra Finna Senato pritraktis la peticion registri ”La Espero Finnlandan” kaj la 20an de majo 1904 ĝi finfine aprobis la aferon, tamen kun tri antaŭkondiĉoj: ke la hejmloko de la societo estu la urbo Jyväskylä, ke la eldona agado de la societo estu efektivigata laŭ ĉiuj koncernaj leĝoj kaj ke la societo ne fondu filiojn ekster la gubernio de Vaasa (Jyväskylä apartenis al tiu gubernio ĝis la jaro 1959).

La antaŭkondiĉoj de la Senato estis grava obstaklo kontraŭ la celita tutlandeco. Tamen Laurén kaj Kuntsi sukcesis en la sama jaro eldoni sian finnan ”Unuan libron”, la 72-paĝan ”Tri Zamenhof'in kansainvälinen apukieli Esperanto. Kielioppi sekä esimerkki- ja harjoitussarja”, kiun presis la eldonisto K.J.Gummerus en Jyväskylä kaj kiu estis vendata je 90 penioj. Kurioze, ĉu modestece, ĉu fuŝe, la nomoj de la aŭtoroj ne aperas sur la kovrilo de la unua eldono. Troveblas nur mencio ”suomenkielelle muodostaneet”.

La Espero Finnlanda sukcesis funkcii nur kelkajn jarojn. Jam en 1908 Laurén transloĝiĝis al Helsinki kaj la funkciado ĉesis. Sed

en 1907, post kiam la premotempo iom mildiĝis rezulte de la tutrusa revolucia aktivado kaj ĝenerala striko, oni finfine sukcesis fondi la tutlandan asocion, EAF:n en Helsinki.

*Laŭ diversaj fontdokumentoj kompilis*
*Jukka Laaksonen*


Jäljennös 3

Pöytäkirjasta
pidetty „La Espero Finlanda"-yhdistyksen perustavassa kokouksessa Jyväskylän Kunnallistalolla 13 p. Toukokuuta 1905.

1 §. Kokouksessa läsnäolivat seuraavat henkilöt, kaikki Jyväskylän kaupungista: Apteekkari Aug. Th. Laurén, Konttoristi [illegible] Kuntze; Kauppias Wilh. Okkonen, Konttoristi T. Riekkola; Rakennusmestari A. Edv. [illegible]; Konttoristi Wilmo Ahlroth; Kauppa-apulainen J. Lammi; Kauppakoulul. E. Kantanen; Konttoristi Hilma Majoori; Telefonisti Hildur Haka; Konttoristi Maija Michelson, Kauppa-apul. [illegible], Sähköteknikko W. [illegible] sekä kauppa-apul. O. [illegible].

2 §. Kokouksen avasi Apteekkari Aug. Th. Laurén, joka myös valittiin [illegible]

## 5 milionoj da vizitoj

La retejo de Sveda Esperanto-Federacio – <*www .esperanto.se*> – registris sian vizitanton numero 5 000 000 dum la nokto inter la 18a kaj 19a de marto 2003 (laŭ mezeŭropa tempo). Dum la lastaj jaroj iom pli ol miliono da vizitantoj retumis en ĝiaj paĝoj ĉiun jaron. Por la jaro 2002 la ekzakta cifero estis 1 096 696.

*Franko Luin en NUN: www.esperanto.se/nun/*

## Konferenco de ILEI

La konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj okazos tuj post la Gotenburga UK la 2.-7. de aŭgusto en Örestrand. Ĝi situas 20 km-ojn norde de Helsingborg. La mendilo estis en Internacia Pedagogia Revuo nro 4/2002 kaj 1/2003. Ĝin vi povas ricevi ankaŭ de Sylvia Hämäläinen, Teivaalantie 85, 33400 TAMPERE, tel. (03) 346 3493.

## junaamiko.inf.hu

La revuo por lernejanoj kaj komencantoj havas tiun novan, pli klaran hejmpaĝan adreson. La unua paĝo prezentas bazajn informojn pri la gazeto. La dua paĝo montras la enhavon de la plej freŝa numero, kune kun du aŭ tri eroj plene legeblaj. Kviza paĝo estas la tria. En ĉiu numero de la revuo estas prezentitaj kvizaj demandoj pri kiuj legantoj konkursas en tri aĝgrupoj. En la paĝo oni vidas la nunajn demandojn, respondojn al la antaŭaj, liston de gajnintoj kaj la regularon. La kvara paĝo prezentas la redakcion kaj la kunlaborantojn, troviĝantaj en dudeko da landoj. Vortlisto de la uzataj 1500 radikoj estas ĉiam konsultebla en la kvina paĝo. Elŝuteblaj estas du-lingvaj listoj por la angla, finna kaj sveda. La redaktoro bonvenigas ofertojn pretigi la liston en aliaj lingvoj. Aldone aperas gramatika resumo, kun la finaĵoj, prepozicioj kaj afiksoj de Esperanto. Antaŭfine troveblas la (ret)adresoj de perantoj kaj la abonprezoj (la plena tarifo estas 12 EUR por kvar 28-paĝaj numeroj). La lasta paĝo titoliĝas Solidareco. Tie legeblas en tabelo junuloj, grupoj aŭ centroj en landoj kie oni volas lerni kaj uzi la lingvon, sed ne havas rimedojn aboni revuojn. Ni tie invitas vin elekti iun el la listo kaj pagi por tiu patronan abonon. Vi estas bonvena gasto al tiu hejmpaĝo!

*Stefan MacGill*
*Eldonado, ILEI*

## Korekto

La nomojn de la tri kantistinoj el Turku sur la koverto de Esperantolehti 1/2003 ne estis tute ĝustaj. Temas pri Merja Uotila kaj Leena Rihu kiuj staras ambaŭflanke de Anna-Liisa Ali-Simola. La redaktejo bedaŭras la eraron.

## Biblioteko – Novakiroj

En la oficejo de EAF estas deprunteblaj:

*Antologio:*

Makedona antologio. Prilep 1981. 154 p.

*Esperantaĵo:*

Historio de Finna sekcio de Kristana Esperantista Ligo Internacia. Espoo 1994. 70 p.

Memorlibro pri la Zamenhof-tago. Ivo Lapenna. Londono 1960. 104 p.

*Faka literaturo:*

Galileo Galilei. Scienca kaj morala valoroj de lia verko. Bento de Jesus Caraĉa. Porto 1948. 56 p.

Konciza historio pri la kornvala lingvo kaj ĝia literaturo. Geoffrey H. Sutton. Blackburn 1969

Vage tra la dimensioj. sciencaj fikcietoj de Konisi gaku. Japanio 1976. 77 p.

*Geografio:*

La dolĉa Franclando. Pierre Delaire. Orléans 1972. 125 p.

Enciklopedieto Japana de T. Nakamura. Osaka 1964. 217 p.

*Historio:*

Historio de Usono. Agostinho da Silva. Porto 1947. 28 p.

*Infanlibroj:*

Hirthara Petro de Heinrich Hoffmann. “Struwwelpeter” en Esperanto. Amuzaj rakontoj kaj drolaj bildoj. Bad Hersfeld 1988. 48 p.

*Kantoj:*

Australio kantas sian historion. 82-a Universala Kongreso, Adelajdo (1997). 36 p.

Bukedo de popolkantoj. Bristol. 33 p.

Israelo kantas. Modernaj kaj malnovaj kantoj en Esperanto. Tel Aviv 1982

*Lernolibroj:*

Egaleco kaj paco per Esperanto. Esperanton alkeiskurssi. Lars Forsman. 129 p.

Esperanto. Marjatta Rautio. Kansanvalistusseuran Kirjeopisto. Helsinki 1983. 139 p.

# Estraro kunvenis

**La unua kunsido de la EAF-estraro dum 2003** okazis en la oficejo en Helsinko la 8an de februaro je 11.35-16.10. Ĉeestis Anna Ritamäki, Tiina Oittinen, Anna-Liisa Heikkinen kaj Eero Rinta-Karjanmaa. Por ke la kunsido estu decidrajta Päivi Saarinen estis dum decidoj kontaktita telefone.

Inter la estraraj kunvenoj okazis retpoŝta decido pri forigo de neaktualaj, sed en nia librotenado registritaj aldonvalorimpostaj kredito (165,16 e) kaj ŝuldo (7,02). Ĉiuj sep respondoj al la propono dissendita de la prezidanto estis jesaj.

La estraro konstatis, ke la materialo de Vilho Setälä apartenas tute al EAF (aperis artikolo pri la afero en nr-o 6/2002).

Aini Vääräniemi, aganto de la jaro 2001 ricevis kiel premion Vojaĝo en Esperantolando-lernolibron kiel novan eldonaĵon kaj elektis de la libroservo Fabeloj de H.C. Andersen kaj la abono de Juna Amiko 2003 estis pagita por ŝi.

La antaŭa flegistino de V. Setälä Hertta Kalkas kontaktiĝis kun membroj de Esperanto-Societo en Turku kaj donacis al EAF/EST fotojn kaj librojn, kiujn ŝi ricevis de Setälä.

Isto Nybom el Jokioinen, lernanto de la 9-a klaso, faris lernejan laboraĵon pri Esperanto. Ĝi pretiĝis en januaro kaj estas nun legebla en la reto.

La estraro decidis nomumi Tapio Sormunen Aganto de la jaro 2002 kaj de jardekoj.

La estraro faris kelkajn precizigojn rilate al Vintraj Tagoj en Lahti. La estraro konstatis ke ne estas sufiĉa intereso por partopreno en Sulkavan soudut, almenaŭ ne ĉi-jare.

La estraro ricevis la liston de tiuj 27 adresoj al kiuj Esperantolehti estas sendata senpage. Prezidanto kaj sekretario kontrolos la liston. La sekretario same kiel la prezidanto ricevos aŭtomate 10 ekzemplerojn de Esperantolehti tuj kiam ĝi estas eldonita.

La estraro decidis pri kunsido de la redakta grupo kun invitotaj spertuloj (Anna Ritamäki, Ilkka Santtila, Riitta Hämäläinen, Raita Pyhälä, Jukka Laaksonen, Aimo Rantanen, Tiina Oittinen, Jukka Pietiläinen, Mikko Mäkitalo, Päivi Saarinen, Katja Lampinen) en Lahti 21.3.2003. EAF pagas tranokton (20 e/persono) kaj manĝon (5 e) kaj vojaĝkostojn.

La estraro traktis skizojn por agadraporto, agadplano kaj buĝeto kaj subskribis la rezultokalkulon. Pri kotizoj la estraro proponas ke ili restu la samaj: individuaj membroj 18 e (inkl. Esperantolehti), aligitaj membroj 2,50 e, aligitaj membroj de ELFI, FEJO kaj Steleto 1,20 e, Societo Nino Runeberg 36 e. La estraro antaŭavertos pri ebla altigo por 2004. (La jarkunveno akceptis la proponitajn kotizojn.)

La prezidanto kontaktiĝos kun Radojica Petrovic, Mauro La Torre kaj Dafydd ap Fergus, esperantistoj kiuj planas partopreni konferencon pri interkultura edukado en Jyväskylä 15.-18.6. 2003 kaj bonvenigos ilin nome de EAF al Finnlando. (Ili ĉiuj pozitive reagis kaj volonte renkontos esperantistojn.)

**La estraro kunvenis la 22an de marto 2003** je 16.30-17 en Lahti. Ĉeestis Anna Ritamäki, Tiina Oittinen, Anna-Liisa Heikkinen, Jukka Noponen, Eila Martin, Päivi Saarinen kaj vicestraranoj Irja Miettinen kaj Eero Rinta-Karjanmaa.

Anna-Liisa Heikkinen sciigis, ke mortis Meri Lehtinen, favora membro de EKH, EAF, UEA + societo Zamenhof. Ŝi aĝis 97-jarojn. Anna-Liisa ĉeestis la enterigan feston kaj kunportis floran saluton de EKH kaj EAF.

La projekta grupo de EAF pri informado kunsidis 9.2.2002 kaj faris poste subvencipeton, kiu estis sendata al Fondumo Esperanto -säätiö 9.3. 2003. La projekta grupo decidis nomi la projekton esperante: *Al kvalita komunikado*, finne: *Laatua viestintään* kaj svede: *Kvalitet i kommunikationen*.

La raporto pri 2002 kaj subvencipeto 2003 de Esperantolehti estis sendata al Edukministerio en marto. La petita sumo estas 1200 eŭrojn. La redakta grupo kunsidis laŭplane en Lahti 21.3.

2003. Ĉeestis Anna Ritamäki, Tiina Oittinen, Päivi Saarinen, Mikko Mäkitalo kaj Katja Lampinen. La grupo faras apartan memorandon.

Tapio Sormunen Aganto de la jaro 2002 kaj de jardekoj ricevos la novan PIV kun diplomo, kiun faros Mikko Mäkitalo. Li ricevos la premion lige al la sekva estrarkunsido en Helsinko. (La premio estis anoncita fine de la jarkunveno sekvatage.)

La estraro decidis prezenti la faritajn jarkunvenajn dokumentojn (agadraporto, financa raporto, agadplano, budĝeto) al la jarkunveno. La estraro konstatis, ke Esperantoklubo de Mikkeli ne pagis membrokotizojn dum pli ol 5 jaroj. La prezidanto kontaktis jam esperantistojn en Mikkeli kaj petis ilin klarigi la aferon ĝis la jarkunveno 2004.

**La estraro en sia nova konsisto kunvenis en Lahti la 23an de marto 2003** je 11.30-12.05. Krom la reelektitoj ĉeestantaj en VT ĉeestis la novelektitoj, Markku Saastamoinen, estrarano (Anna-Liisa Heikkinen ne rekandidatiĝis kiel estrarano) kaj Tuomo Grundström, vicestrarano (Irja Miettinen ne rekandidatiĝis).

La estraro reelektis la funkciulojn: vicprezidanto Päivi Saarinen, sekretario Tiina Oittinen, kaj konstatis ke Anna-Liisa Heikkinen daŭrigos kiel kasisto kaj librotenisto.

La estraro ricevis Raporton de la Vortara grupo kaj ses de la grupanoj subskribitajn ekzemplerojn de la kontrakto pri kopirajto subskribotan de la prezidanto kaj sekretario de EAF. Tiu kontrakto estis jam akceptita de la EAF-estraro dum la prezidanta periodo de Jukka Laaksonen. Krome la estraro ricevis skizon por kontrakto inter EAF kaj EKH pri uzo de la oficejo.

La sekva kunsido estis decidita por la 12a de aprilo 2003 je 11.00 en la asocia oficejo.

La raporton preparis la prezidanto surbaze de la protokoloj.

# Agadplano por la jaro 2003

*La jenan agadplanon akceptis la jarkunsido de EAF en Lahti la 23an de marto.*

## Instruado

La asocio daŭrigu serĉadon de eblecoj por diversaj Esperanto-kursoj kaj kunlaborante kun ELFI prizorgu plialtigon de la faka nivelo de la instruistoj. La asocio prizorgu pri havebleco de taŭgaj instrumaterialoj.

## Informado

La asocio kadre de projekto *Al kvalita komunikado* okupiĝu pri la sistemigo kaj kvalitaltigo de la informa agado. Kadre de la projekto la asocio faru superrigardon kaj analizon pri la stato de la informado (retaj kaj paperaj informoj, aliaj rimedoj) kaj ellaboru planon por la sekvaj jaroj. Informado estu grava temo en la ĉefaj renkontiĝoj, VT kaj AT, kaj la asocio laŭ siaj eblecoj organizu ankaŭ apartan informan seminarion por aktivuloj. La asocio aperigos ĝisdatigitan version de la informilo *Esperanto tänään (Ĝisdate pri Esperanto)*.

## Interna agado

La estraro organizu la laborojn utiligante la haveblajn fortojn efike kaj racie, instigante pliajn homojn partopreni en aktiva agado en tutlanda kaj loka niveloj. Vigligo de la rilatoj inter lokaj Esperanto-kluboj estas prioritato. Tion povas antaŭenigi interŝanĝo de informiloj inter la kluboj, aperigo de informoj en Esperantolehti kaj kontaktoj en la retlisto EAF-agadas. Aparte la asocio atentu la evoluigon de la asocia organo Esperantolehti por informi la membraron ĝustatempe kaj interese. Nia organo estas ankaŭ grava rimedo por klerigi la membraron pri movadaj aferoj.

### 4. Internaciaj kaj eksteraj rilatoj

La asocio partoprenas laŭ siaj fortoj kaj eblecoj projektojn de UEA kaj regionan agadon en Eŭropo speciale kun Eŭropa Esperanto-Unio inkluzive de la Komunikadcentro en Bruselo kaj kun la Landaj Asocioj de UEA en Nordio. La asocio partoprenas en la realigo de la laborplano de UEA *Al lingva demokratio* interalie per sia projekto *Al kvalita komunikado*. Krome ĝi klopodu trovi formojn de kunlaboro kun diversaj organizoj, kies celoj kongruas al la celoj de la asocio, speciale kun la UN-Asocio de Finnlando kies membroasocio EAF estas.

### 5. Junulara agado

La asocio kunlaboru kun FEJO. Aparte la asocio notu la neceson de intergeneracia diskuto kaj sufiĉan konsideradon de la opinioj de la junaj esperantistoj en la asocia vivo. Laŭ siaj eblecoj la asocio subtenu la realigon de ideoj aperintaj en la junulara asocio.

### 6. Financoj

Sekura financa bazo estas esenca kondiĉo de efika kaj sukcesa agado. La asocio agadu tiel, ke ĝia kapitalo ne perdiĝu en kutimaj ĉiutagaj elspezoj. Krome ĝi decidu pri ĉiuj siaj planoj kaj agadformoj konsiderante la utilon por ĝiaj ĉefaj celoj. La asocio aktive serĉas eksterajn financajn rimedojn kaj subvencieblecojn. Ekzistas esperoj, ke jam ĉi-jare akireblos signifa projekta financado, kiu ebligas pliampleksigon de la asocia agado.

# Al kvalita komunikado

**EAF-projekto por levi la kvalitan nivelon de la informa agado**

(finne: Laatua viestintään, svede: Kvalitet i kommunikation)

*Fondumo Esperanto-säätiö (FES) akceptis la peton de EAF por la projekto Al kvalita komunikado. La estraro de FES kunsidis lundon post la jarkunveno de la asocio. Tial ni ne povis anonci la pozitivan decidon en la kunveno, nur iom prezenti niajn ideojn por levi la kvalitan nivelon de nia informa agado.*

*Jen priskribo de la projekto, kiu estas mallongigita versio de la projektpeto (ĉiuj aliaj partoj krom la la kvara parto Projektpriskibo kaj celoj aperas en plena longeco). En la sekva numero ni publikigos pli detalajn informojn pri la ĉi-jaraj planoj kaj la buĝeton. Aldone vi trovas ankaŭ la pozitivan reagon de FES.*

*Nun ni havas je nia dispono 7 500 eŭrojn por realigo de agadoj kadre de la projekto ĝis la sekvaj Vintraj Tagoj kaj principan aprobon por 25 000 eŭroj se ni laŭorde realigos la planojn. Viaj proponoj kaj komentoj estas bonvenaj!*

### 1. Enkonduko

La estraro de Esperanto-Asocio de Finnlando plurfoje dum la pasinta jaro diskutis la fortojn kaj malfortojn de la asocia agado – kaj ĝenerale de la poresperanta agado en nia lando – kun la celo lanci vastan projekton por plibonigi la agadon kaj krei rimedojn por signifa antaŭenigo de Esperanto en Finnlando. Dum sia kunsido en julio 2002 la estraro venis al la kunkludo ke ni bezonas vastan informan projekton.

Sekve la estraro okazigis seminarian kunsidon en Kimito la 9an kaj 10an de novembro dum kiu ni multe diskutis pri eblaj konkretigoj. Ni konstatis, ke nia informa agado estas en stato

malklara, kvankam nekatastrofa, kaj ke ni unuavice bezonas strukturigon kaj sistemigon de ĝi. Surbaze de tia superrigardo ni povos fari analizon pri la nuna stato kaj sekve strategie elekti la prioritatajn konkretajn agadojn. Kiel klara celo leviĝis la ĝenerala bezono de plialtigo de la kvalita nivelo de nia informa agado. Ni starigis projektesploran grupon, kiu faru la necesajn esplorojn kaj superrigardojn.

La projektesplora grupo (kun la sama konsisto kiel la projekta grupo, vidu sube) kunsidis en la oficejo en Helsinko la 9an de februaro 2003. Ni venis al la konkludo ke ni celas realigi trijaran projekton, kiu kontribuu al la sistemigo de nia informa agado, konkrete eduku la membraron por ke ni havu pli da kompetentaj informantoj kaj sekve pli kvantan kaj pli kvalitan komunikadon de niaj ideoj.

La projekton ni decidis nomi Al kvalita komunikado por klare signali ĝian celon internan, la kreon de la ĝustaj kondiĉoj por ebligi pli kvalitan komunikadon de niaj ideoj, kaj samtempe signali ĝian celon eksteran, la kreon de konscio en la socio pri la eblecoj de pli kvalita internacia komunikado per Esperanto.

## 2. Projekta grupo

Prezidanto: Anna Ritamäki, prezidanto de EAF
Sekretario: Tiina Oittinen, sekretario de EAF
Membroj: Päivi Saarinen, vicprezidanto de EAF; Osmo Buller kaj Jukka Pietiläinen
Kiel observanto estas invitita la prezidanto de FEJO, Patrik Austin

## 3. Temposkemo

Ni taksas ke taŭgas realigi la projekton Al kvalita komunikado en tri fazoj dum tri jaroj, 2003-2005. Tiu tempodaŭro ŝajnas al ni sufiĉa por doni signifan pozitivan injekcion al nia informado kaj por krei bazon por estontaj evoluigaj projektoj, interalie por la festado de la 100-jariĝo de EAF en 2007.

EAF raportos al Fondumo Esperanto pri la evoluo de projekto per duon- ĝis unujaraj intervaloj, prezentos planon por la sekva fazo antaŭ ĝia komenciĝo kaj prezentos konkludojn de la pasinta fazo post ĝia finiĝo.

## 4. Projektpriskibo kaj celoj

Ni deziras dum la trijara projektoperiodo krei informan strukturon, kiu povas funkcii kiel fundamenton por longdaŭra agado. Paralele kun la strukturaj laboroj, kiuj inkluzivas trejnadon de la membroj, ni faros konkretan informan laboron al elektitaj celgrupoj kaj al la ĝenerala publiko pere de elektronika kaj surpapera informmaterialo, amaskomunikilaj kontaktoj kaj ĉeesto en diversaj eventoj.

Temas pri tri ĉefaj agadoj realigataj paralele:

1. Informa strukturo. Superrigarda kaj sistemiga laboro, kiu celas krei bazon por analizo de la stato de nia informa agado kaj sekve konduki al informa strategio de nia asocio.
2. Trejnado de la membraro. Konscia agado por trejni niajn membrojn pri informa agado kaj por pliklerigi ilin pri la diversaj facetoj de la fenomeno Esperanto vastasence.
3. Informa laboro. Kontribuo al pli vasta rekono de la valoroj de Esperanto kaj al pli bona ĝenerala nivelo de scioj pri nia lingvo en Finnlando.

## 5. Buĝeto

Buĝettakso por la unua fazo (februaro 2003 ĝis marto 2004) estas 7500 eŭroj kaj por la tuta projektperiodo sume 25 000 eŭroj.

(Detala buĝeto de la projekto aperis aldone al la peto)

## 6. Resumo

La baza celo de la projekto estas levi la kvalitan nivelon de la informa agado de EAF por pli bone, pli strategie, kohere, kvalite kaj kompetente informi la publikon pri la fenomeno Esperanto vastasence. Ni kredas ke la projekto Al kvalita komunikado signife kontribuos al altigo de la ĝenerala nivelo de scioj pri Esperanto kaj al pli vasta rekono de la valoroj de nia lingvo. Ni celas levi la prestiĝon de Esperanto kaj de la esperantomovado en Finnlando.

## Esperantoklubo de Helsinki

La novaj estraranoj de EKH estas la sekvantaj:
Taneli Huuskonen, prezidanto
Riitta Hämäläinen
Sakari Kauppinen, vicprezidanto
Ritva Sabelli, sekretario
Eeva Vaijärvi, kasisto
Vicestraranoj:
Anna-Liisa Heikkinen, Timo Pirinen

## Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj renovigis sian statuton

Dum sia jarkunveno en Lahti la 22an de marto ELFI renovigis sian statuton.

Samtempe oni decidis pri nova skribo de la finna nomo, tiel ke ĝi nun estas Suomen opettajien (antaŭe opettajain) esperantoliitto ry. Samtempe ELFI ankaŭ ricevis oficialan svedlingvan nomon Lärarnas esperantoförening i Finland rf.

Laŭ la statutoj la asocio ne havos novajn dumvivajn membrojn. Tamen la nunaj dumvivaj membroj kompreneble konservas sian membrecon.

Alia ŝanĝo estas ke la estraro havos krom la prezidanton nur kvar membrojn, antaŭe ses. Krome estos du vicmembroj. Ĉijare oni ankoraŭ elektis estraron laŭ la malnova statuto.

Kiel prezidanto daŭrigas Carola Antskog kaj la aliaj membroj estas Anna-Liisa Ali-Simola, Sylvia Hämäläinen, Erkki Kemppainen, Tiina Oittinen, Raita Pyhälä kaj Tapio Sormunen.

Dum la jaro ELFI kadre de sia Euroscola-projekto instigos junajn homojn lerni esperanton kaj faros laborofoliojn por la vidbenda kurso Mazi en Gondolando. La membroj aktive informos pri Esperanto kaj aranĝos kursojn.

*Carola Antskog*

## Jarkunveno en Salo

Salon Esperantoseura-Esperantoklubo de Salo kunvenis la 23an de februaro.

Kiel prezidanto funkcias denove Matti Wallius kaj kiel kasisto Sinikka Hangas. Nova sekretario estas Mikko Heikkilä. Li estas nova membro, kiu eklernis esperanton en oktobro.

La klubo havas dek du membrojn. Dum la Nordiaj tagoj en Salo en majo oni esperas vidi samideanojn de la ĝemelurboj Katrineholm, Odder kaj Vennesla. Eventuale la klubo dum la aŭtuno aranĝos ekspozicion pri la lingvo.

*Carola Antskog*

# La pozitiva respondo de FES

La estraro de Fondumo Esperanto kunsidis lunde la 24an de marto 2003. Sekvatage EAF ricevis la sekvan ĝojigan informon:

**Al Esperanto-Asocio de Finnlando**

La estraro de Fondumo Esperanto diskutis kaj decidis pri via petletero por la projekto “Al kvalita komunikado” en sia kunsido la 24an de marto. Ni trovis la projekton bone planita kaj sendube realigebla. Aparte pozitiva trajto estas, ke la projekto enhavas ankaŭ analizon de la propraj informaj strukturoj de la asocio kaj edukadon de la aktivuloj; ĉio ĉi povos signife plialtigi la kvaliton de la informado pri-Esperanta en Finnlando. La sola parte nerespondita demando restas, kiel la finna movado sukcesos respondi al la eventuala kreskanta bezono de instruado kaj lerniloj post la sukcesa informa kampanjo.

Fondumo Esperanto decidis principe subteni la tutan trijaran projekton, kaj decidis tuj transpagi al EAF la petitajn 7500 eŭrojn por la unua fazo de la projekto.


*En la nomo de*
*Fondumo Esperanto-säätiö:*
*Jouko Lindstedt*

# Esperanto-ekspozicia semajno en la biblioteko de Runosmäki

Dum la 5-a semajno de 2003 Esperanto-societo en Turku havis en la biblioteko de Runosmäki ekspozicion de esperanta lernomaterialo, kio konsistis el dudek kvar verkoj. Ĉe la plenkreskula flanko troviĝis i.a. la *Unua lernolibro* de Zamenhof, *Plena Ilustrita Vortaro* (1970), *Esperanta Enciklopedio* kaj *Gvidlibro por supera ekzameno*. El la kurslibroj menciindas *Egaleco kaj paco per Esperanto* de L. Forsman (finna traduko R. Pyhälä), kaj *Faktoj kaj fantazioj* de M. Boulton. El la legolibroj fascina novelaro *Kie boacoj vagadas* de nia hejmlanda verkistino E. Salovaara kaj por angleparolantoj entuziasmiga verko *Everyone's own language* de M. Mullarney. Por progresantoj la plej defia, altkvalita tiel lingvostile kiel enhave kaj aspekte, novbakita gvidlibro pri la Esperanta kulturo *Vojaĝo en Esperanto-lando* de B. Kolker. Pri la libroj por infanoj, gejunuloj estu menciitaj i.a. la fabelo de H. C. Andersen *La marvirineto*, la pli moderna rakonto de A. Lindgren *Pipi Ŝtrumpolonga*, la malnova, sed tre bonmetoda lernolibro de V. Setälä *Esperanto: Privilegia vojo al lingvoscio*, kaj la multlingven tradukita bildstrio de Coscinny (teksto) kaj Uderzo (desegnaĵoj) *Asteriks kaj Kleopatra*. La sortimenton dividis al du partoj informmaterialo kiel grandigitaj kopioj pri gazeteltondaĵoj, la informa vidbendo de EST kaj la instrua de Mazi, Jarlibro kaj Esperanto-katalogo de UEA kaj la kongresa libro de Tamperea UK de 1995. Laŭ bibliotekisto Veikko Pöllänen (en la bildo) la tutaĵo ŝajnis kolorriĉa kaj alloga. La libroj estis elektitaj ĉi-cele ne nur laŭ la enhavo, sed ankaŭ laŭ ilia aspekto. La ekspozicio ne estis deĵorita de nia societo – kvankam kelkaj libroj estis privataj kaj kvankam mankas en la biblioteko elektra gardado – do ĉiu-tage mi iris kontroli kaj ĝojigis min trovi ĉion sekure kaj precipe en eta malordo anstataŭ en netuŝita elmeto. Dankinde pri la aranĝaĵo sciigis loka gazeto Turun Sanomat per ĝustatempa raporto: Asiaa esperantosta (faktoj pri Esperanto).

*Anna-Liisa Ali-Simola*

Notu, ke la supre menciita Maire Mullarney estas el Irlando, ne el Anglio, kiel estis erare skribita en Esperantolehti 6/2002.




# Pratempaj amuzoj

Uusi sarja jatkuu! Hupia ja hyviä muistoja menneiltä FEJO-vuosilta.
koonnut: Katja Lampinen




FEJO-bulteno 4/87




FEJO-bulteno 4/88

ALVENIS FEJO-ĈEMIZOJ


Nun vi povas mendi ege luksan kaj esperantan ĉemizon! Tri modeloj mendeblas, nome ĉemizo kun aŭ sen kolumo + poŝoj kaj T-ĉemizo. Sur la brusto aperas jena teksto: 'LA LINGVO de la VERDA STELO (literoj dukoloraj; teksto mendeblas pantalonoj. Vi

# ABC DE ESPERANTO

**4. SUURI ASKEL KOHTI MAAILMANRAUHAA**

MIKSI YHTEINEN KIELI ON TÄRKEÄ?

- koska välimatkat maailmassa ovat kovaa vauhtia lyhenemässä, ja kaikkien on helppo saada kontakteja ympäri maapalloa. Miljoonat ihmiset matkustavat vuosittain ulkomaille työn puolesta tai huvikseen.




**MAAILMAN 5 MILJARDIA IHMISTÄ PUHUU YLI 3000 ERI KIELTÄ**

Maailmanlaajuisia keskusteluja yhteisistä ongelmista, rauhasta, luonnonsuojelusta, terveydestä, koulutuksesta ja hyvinvoinnista voidaan käydä yhteisellä kielellä.

*Esitteen THE ABC'S OF ESPERANTO julkaisi vuonna 1971 ELNA (Esperanto-League for North America). Sen lyhensi vuonna 1982 Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj (ELFI) ja käänsi suomeksi ja sovelsi Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) keväällä 1989.*

La solvo de la krucvort-enigmo: Ni pardonpetas pri ebla konfuzo, kion kaŭzis la vorto 4) horizontale, posesivo nepersona, kiu kompreneble devas esti ONIA.

La gajninto de la T-ĉemizo estis Gun Gerdman el Svedio. FEJO gratulas!

| | | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| N | O | V | I | C | O | F | I | N | N | O | J | ■ |
| A | V | O | ■ | E | N | E | F | O | I | R | C | ■ |
| S | O | M | E | R | A | J | ■ | T | A | G | O | J |
| A | M | U | Z | A | ■ | O | ■ | U | N | I | K | A |
| Ŭ | ■ | Z | O | M | B | R | O | ■ | A | O | U | R |
| N | E | E | K | I | P | I | I | N | S | U | L | O |
| O | L | O | O | K | O | P | A | R | O | L | O | ■ |

FEJO-bulteno 4/88

# Komenciĝis superba FEJO-jaro 2003

Fejoanoj havis trebonan semajnfinon en Lahti 22.-23.3. Oni aktive partoprenis la Vintrajn Tagojn de EAF: Katja Lampinen gvidis du prelegojn pri komunikado, Diskejo de FEJO vendis K-diskojn kaj ĉemizojn kaj superba FEJO-teamo gajnis la konkurson pri filmdublado.


En Lahti oni ankaŭ jarkunsidis. La estraro kaj la aliaj funkciuloj en la jaro 2003 estas:

Prezidanto Patrik Austin, Helsinko
Vicprezidanto Pipsa Ahonen, Turkuo
Sekretario Mikko Mäkitalo, Turkuo
Estrarano Katja Lampinen, Helsinko
Estrarano Paula Niinikorpi, Raumo
Estrarano Timo Pirinen, Hamari
Vicestrarano Liisa Viinanen
Kasisto Eeva Vaijärvi
Reviziroj Tuula Virolainen kaj Jukka Pietiläinen

La membrokotizo de FEJO en la jaro 2003 estas 13 eŭrojn kaj por la veraj membroj kaj la subtenaj membroj. Se vi pagis la membrokotizon en la pasintan jaron, vi ricevos la pagilon poŝte. Se ne, vi povos pagi la kotizon rekte al la konto de FEJO: 101130-227446 (Nordea).

Se vi havas problemojn, demandojn aŭ aliajn aferojn, kontaktu kun la nova sekretario: Mikko Mäkitalo, Vanha Hämeentie 41 as. 9, 20450 Turku. Tel. (02) 237 3848. Rete: <*makimik@hotmail.com*>.

Havu aktivan FEJO-jaron 2003!



# Sur la nokta ĉielo

Lastfoje ni konatiĝis interalie kun la plej brila stelo, Sirius. Ĝi tamen estas ne la plej brila objekto en la ĉielo. Dum vesperoj de tiu ĉi printempo alte sude troviĝas la giganta planedo Jupitero. Ĝi estos la klare plej brila ĉiela objekto dum ĉiuj vesperoj ĉi printempe, krom intertempe la Luno. Dum subeniro de la Suno (*auringonlasku*) en aprilo ĝi estos alte sude, pli poste printempe kaj pli poste nokte ĝi moviĝas direkten de la okcidenta horizonto.

Por homo, kiu nudokule rigardas la ĉielon, Jupitero aspektas esti nur brila lumpunkto inter multaj aliaj. Tamen per optika ilo ĝi ofertas ion tre specialan. La kvar plej grandaj lunoj de Jupitero estas facile videblaj per teleskopo. Ili aspektas kiel vico de lumpunktoj apud la planedo. Mem Jupitero per teleskopo aspektas ne nur lumpunkto, sed oni vidas eĉ kelkajn trajtojn, kutime helajn kaj malhelajn zonojn, en la surfaco de la planedo.

La kvar lunoj de Jupitero estas videblaj ankaŭ per binoklo, sed ne frustriĝu, se vi provas kaj ne vidas ilin, ĝi estas ne tre facile. Pli bona maniero estas viziti la plej proksiman hobiastronomian observejon kaj peti vidi Jupiteron per teleskopo.

La lunoj ĉiam vidiĝas en proksimume rekta linio. La kaŭzo de tio estas, ke la ebeno de ilia orbito (*kiertoradan taso*) ĉirkaŭ Jupitero preskaŭ koincidas kun la ebeno de la orbitoj de la planedoj ĉirkaŭ la Suno. Tio estas ne pure hazarda koincido, ĉar preskaŭ ĉiuj orbitoj en la Sunsistemo (*Aurinkokunta*) estas en proksimume la sama ebeno. Tio dependas de la naskiĝprocezo de la Sunsistemo.


Antaŭ miliardoj da jaroj estis nubo de gaso (*kaasupilvi*) en la spaco. Tiu nubo havis en iu direkto turnantan moviĝon (*pyörimisliike*). La nubo densiĝis kaj formis la Sunon, la planedojn kaj aliajn astrojn de la Sunsistemo. En la rezulto restis la sama turndirekto, kiun la origina nubo havis, kaj ni vidas tiun direkton en la unueca ebeno, kiun orbitoj en la Sunsistemo havas.

Oni povas bone rimarki la moviĝon de la lunoj de Jupitero, se oni observas ilin dum iom da tempo. La periodo por unu rondo ĉirkaŭ Jupitero por la plej proksima de la kvaropo estas 2 tagoj, kaj por la plej malproksima 17 tagoj. Do, vidata en du sinsekvaj noktoj, aŭ jam dum kelkaj horoj en sama nokto, la ordo de la kvaropo jam videble ŝanĝiĝas.

La kvar lunoj de Jupitero havas tre specialan rolon en la historio de scienco. Ili estis la unua rekta pruvo, ke ĉio en la universo ne moviĝas ĉirkaŭ la Tero. Nuntempe ni ja scias, ke la sola natura objekto, kiu vere iras ĉirkaŭ la Tero, estas la Luno, sed vidata el nia loko sur la surfaco de la Tero tio estas neniel evidenta.

Laŭ antikva mondpercepto la homoj supozis, ke la Tero estas la centro de ĉio. Kiam Galileo Galilei per sia ĵus inventita teleskopo en jaro 1610 trovis, ke Jupiteron ĉirkaŭiras kvar aliaj objektoj, oni devis konstati, ke la Tero ne estas centro de ĉio. Ekde tio ĉio specialeco de nia loĝloko iom post iom tute perdiĝis: Ni loĝas en malgranda planedo apud mezgranda stelo, kiu situas en randa regiono de galaksio, kiu estas tute tipa inter multaj pli kaj malpli grandaj.

*Mikko Mäkitalo*



*Per astronomia teleskopo Jupitero vidiĝas esti flava globo, kiun ĉirkaŭiras kvar lunoj. Tion eblas vidi ankaŭ per binoklo, sed la facileco de sukceso dependas de la ecoj de la binoklo. La griza foncirklo en la bildo markigas en teleskopo videblan areon de la ĉielo.*

# Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

**Muutokset ja lisäykset osoitteistoon: Ilkka Santtila, Mannerheimintie 40 D 86, 00100 Helsinki, s-posti *ilkka.santtila@esperanto.fi* mieluummin kirjallisena.**

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. 💻 Sakari Kauppinen, sakari@skau.pp.fi
- Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi
- Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä (Seija ja Kari Kettunen), Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609 💻 kari.kettunen@pp1.inet.fi
- Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. 💻 martti.pennanen@pp.phnet.fi
- Mikkelin Esperantokerho / Esperantoklubo de Mikkeli, (Elli Husso) Porrassalmenkatu 27 B 51, 50100 Mikkeli.
- Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Allan Mehtonen) Valtatie 6-8 B 15, 90500 Oulu
- Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla 💻 matti.wallius@pp.inet.fi
- Esperantoseura Antaŭen ry. / Esperantosocieto Antaŭen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Lauri Liukkonen, Varstatie 37, 37500 Lempäälä, 💻 lauliu@sci.fi)
- Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. 💻 tiina.oittinen@pp.inet.fi

- Suomen opettajien esperantoliitto / Esperanto-Ligo de Finnlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. 💻 cantskog@kolumbus.fi. Tilinro: 800015-129185
- Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. 💻 fejo@esperanto.fi. Tilinro: 101130-227446
- Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. 📠 (09) 660 651

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu v. 2003 on 18 • sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 36 •. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä, jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita.

## ESPERANTOLEHTI

**ilmestyy vuonna aperas dum la jaro** 2003

| Nro | Red.grupo komencas | Limdato | Aperas |
|---|---|---|---|
| 3 | 1.5 | 15.5 | 1.6 |
| 4 | 1.7 | 15.7 | 1.8 |
| 5 | 1.9 | 15.9 | 1.10 |
| 6 | 1.11 | 15.11 | 1.12 |

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

## Ilmoitushinnat ◆ Anoncprezoj

| Ulkopuoliset mainostajat / Ekster membraro: | Jäsenet / Membroj: |
|---|---|
| 1/1 sivu/paĝo 100 • | 1/1 sivu/paĝo 50 • |
| 1/2 sivua/paĝo 60 • | 1/2 sivua/paĝo 30 • |
| 1/4 sivua/paĝo 40 • | 1/4 sivua/paĝo 20 • |

------------------



Palautusosoite: Esperantoliitto
Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki




***Eble la artikolo pri gitaristoj en la pasinta numero vin scvolemigis pri la aspekto de la verkisto kaj de la malliberuloj. Sur la foto vi vidas Vesa Pölkki meze kun siaj kunludantoj.***

## Seuraava numero ◆ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy kesäkuun alussa. Jutut 15.5.2003 mennessä Anna Ritamäelle. Venonta numero aperos en la komenco de junio. Artikoloj ĝis 15.5.2003 al Anna Ritamäki. Osoite/adreso: Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito, puh/tel. (02) 423 146, s-posti/rete: <*esperantolehti@esperanto.fi*>.

**Pica-Paino Oy, Jyväskylä 2003**